

# Kompozito

Kompozito, kompozita materialo – kunmetita materialo, kombinita materialo, estigita artefarite kaj sisteme per fizika kunligo de pli simplaj materialoj. En la baza substanco (matrico) estas certa kvoto de armaj elementoj, kiuj formas superstrukturnon. La baza materialo de matrico estas metala, makromolekulara aŭ silikata. La armaj komponentoj estas fibraj elementoj el metalo, vitro, ceramiko aŭ karbono. Tiel aperas novaj materialoj kun pli taŭgaj proprecoj, ekz. fibrobetono, epoksidaj rezinoj kun karbonaj fibroj, armita vitro, vitrolaminatoj. Cetere, ankaŭ jam klasika ŝtalbetono estas kompozita materialo.

Por la koncerna materialo en Esperanto mankas nomindiko. En la ĉeĥa ni nomas ĝin *kompozit*. Simile en pluraj aliaj eŭropaj lingvoj: En la germana *Komposit* aŭ *Kompositum*, en la angla *composite*. Esperanto heredis ĉu rekte, ĉu pere de eŭropaj lingvoj, multon el la latina lingvo, en kiu ni trovas la verbon *com-pōnō*, *posuī*, *positum* kaj la adjektivon *compositus*. La adjektivo signifas: kunmetita, kunligita, muntita, kompilita, aranĝita – simple kompozita, diference de la muzika versio de komponita verko, kiu estas ankaŭ kompilita.

La homonimio de kompozitoj en la familio de dukotiledonaj plantoj kaj de kompozita ordo ĉe kapituloj de antikvaj kolonoj estas neniel ĝena.

2004-12-26

J. Werner